

& La lango kaj la mano:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 174 paŝoj dum 2 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Bresta balado, disduigante versojn.>

(#Melodio:

<1,5:29> (

a;Ti /doTi redo doTi Ti;La LaLa LaMi LaLa; LaaLaTi doTi TiTi Ti;Ti TiTi Tire dodo;

(#Rekantaĵe: TiLa La SiLa Ti La; LaaLaLa La3Mi So3So Fa3Mi; MiiMiMi LaTi do Ti La)

)×6)+

(&Strofoj:

'1 Rifuĝis vulpo: Pelis ĝin ; ĉasisto kun armilo. ; Lignohakiston trovis ĝi, ; lin petis pri azilo,

(×:; **Paŝu gajan la dancon ; Brilas aŭroro bele taga ; Venu en alta somertemp'!**)

'2 kaj li en tendo kaŝis ĝin. ; Tuj poste alrapidis ; kaj kriis la ĉasisto: "Hom'! ; ĉu vulpon vi ne vidis?"

'3 La homo negis per parol', ; sed montris per mangesto ; la lokon, kie kaŝis sin ; la rifuĝanta besto.

'4 La vorton kredis la ĉasist', ; la geston ne komprenis, ; plu kuris do. El la kaŝej' ; la vulpo nun elvenis

'5 kaj paŝis for silente. "Ej!" ; — la homo diris — "strange! ; Mi savis vian vivon, kaj ; vi iras for sendanke!"

'6 Respondis tiam lin la vulp': ; "Mi dankus plej distinge, ; se via man' kaj via lang' ; parolus samalingve."